Mi jus informiĝis, ke la ret-programmo www.typeit.org – kiu laŭ mia kredo estas la plej bona programo, kiun mi iam vidis por la utiligo de kromsignitaj literoj en diversaj lingvoj – lastatempe aldonis Esperanton al sia menuo. La kreanto, Tomasz Szymalski, tre deziras, ke oni disvastigu ĉi tiun informon kiel eble plej vaste.

Okaze se vi ne scius pri ĝi, mi mencias ankaŭ ke sub [www.ikso.net](http://ikso.net) troviĝas 23-paĝa kolora

broŝuro pri Esperanto, havebla, mi kredas, en aliaj lingvoj.

Arthur C. Oliver



Granda entuziasmo ĉe kursoj en D.R. Kongo

Estimataj,

Kiel planite, la unua Esperanto-leciono ĉe Lerneja Komplekso Anna Polizzi okazis la 7an de novembro.

Estas granda entuziasmo miaflanke kaj flanke de instru-

BY E-MAIL AND LETTER

istoj/lernantoj, kiuj partoprenas en la Esperanto-kurso por la instruistoj kaj administrantoj; kaj partoprenas ne nur la ge-instruistoj kaj la administrantoj, sed ankaŭ la gardisto! Do, ni firme ekvojis kaj ni esperas firme atingi la celon. Estas substrekinda la ĉeesto ĉe la inaŭguro de la prezidanto de la landa asocio, de kelkaj esperantistoj de EKM-filio, inter ili, kelkaj membroj de la ILEI-sekcio. La etoso estis tute Esperanta kaj frata en tiu bela lernejo, kiu tute aspektas esperantista. Jam ĉe la eniro, oni

• 'Firefox' kaj 'Open Office' en Esperanto

Laŭ Caloga.com, kompara kaj gvida retejo por aĉetado de alt-teknika materialo kun kvin-miliona abonantaro, la sukceso de la retesplorilo 'Firefox' (aŭ retfoliumilo, ttt-legilo) konfirmas tiun de la programoj kun malfermita fonto (t.n. 'open source'). Firefox rapide evoluas en kvalito kaj kapabloj. Ĝia uzantaro kreskis de 21 ĝis 24%. La ĉefa intereso por Esperantu-uzantoj estas en tio, ke Firefox estas uzebla ankaŭ en Esperanto. Ankaŭ la oficeja programaro 'OpenOffice' havas novan version ekde decembro. Informoj pri ties Esperanto-versio estas troveblaj <http://eo.openoffice.org/>.

RETE KAJ LETERE

Daŭrigo el la antaŭa paĝo
povas legi la nomon de 'Zamenhof', 'Esperanta konstruaĵo', ... Tio kaptas la atenton de la trapasantoj. La pentraĵo sufiĉe propagandas pri Esperanto.

Kiel planite, la unua etapo temas pri la Esperanto-trejnado de la instruistoj, kaj la dua etapo temas pri la trejnado de gelernantoj fare de instruistoj. Laŭ la nuna disponebleco de lernolibroj, ni uzas la Zagreban Metodon. Ni planas fini tiun bazan kurson post tri/kvar monatoj. Ni planas dum tiu fazo iri pluen, ke niaj lernantoj lernu preskaŭ la kompletan gramatikon de Esperanto. Do, eble ni aldonos unu monaton al nia programo. Kompreneble, ke ni trejnas estontajn Esperanto-instruistojn, kiuj devas havi efikan bazon.

Dankon al ĉiuj, kiuj kuraĝigis nin kaj promesis subteni la agadon aŭ per sendado de libroj aŭ per kuraĝigaj mesaĝoj.

Jean Bosco Malanda
Landa Reprezentanto de
IKUE/Kongo D.R.
BP 761, Kinshasa 11 RDC

[http://eo.wikipedia.org/wiki/OpenOffice.org](http://org/respondaro.html)

[http://eo.wikipedia.org/wiki/Mozilla_Firefox](http://www.mozilla.com/ko/), [http://eo.wikipedia.org/wiki/Mozilla_Firefox](http://www.ipernity.com/doc/kallekn/757692), <http://www.ipernity.com/doc/kallekn/757692>, <http://tradukado.esperanto.org.uy/>, <http://dejo.dk/enhavelementoj/>

[http://www.liberafolio.org/2008/firefox-nun-oficiale-en-esperanto](http://nyheder/firefox-en-esperanto/view?set_language=eo).

Multaj pliaj paĝoj troveblas per serĉado kun 'firefox esperanto' – entute 177 000 mencioj!

Aldoneblaj programo-komplementoj en aŭ por Esperanto troveblas ĉe la paĝo <https://daŭrigo sur paĝo 16>

EL JUNA AMIKO

humuro

If you would like to subscribe to *Juna Amiko*, send £13 to EAB, tel. 0845 230 1887 (see p. 2) or order online: www.esperanto-gb.org.

– Bonan tagon! Ĉu vi havas or-fiŝojn?
– Jes.
– Po kiom ili kostas?
– Po kvar eŭrojn.
– Prefere mi petas arĝent-fiŝojn.

marĉo: tero duon-flua de akvo / proponi: rekomiendi ion fari / rektamaci: protesti kontraŭ io / ruino: restajo de konstruaĵo malnovega / peto: promenvojejo / zini: direkti veturilon



– Sinjoro Tajloro! Ĉi-semajne vi malfruis en la laboro jam la kvinan fojon. Ĉu vi scias, kion tio signifas?
– Ĉu estas jam vendredo...?



Stečjo iras kun sia patro al ekskurso province. Ili ekvidas ruinojn de mezepoka fortikajo. Stečjo almontras ĝin:

– Vidu, paĉjo! Ĉu panjo lernis la aŭto-stiradon ĉi tie?



Če fervoja stacidomo maljunulino klarigadas al jus alveninta turisto:

– Plej rapide vi atingos la fortikajon laŭ tiu pado tra la marĉo.
– Ĉu tra la marĉo? Ĉu ne estas danĝere?
– Ne timu, kara. Al multaj mi proponis jam tiun vojon, kaj neniu el ili revenis reklamacii.

“Plej sukcesa renkontiĝo”

La aŭtuna renkontiĝo de JEB okazis je la 25a de septembro en Londono. Ni kunvenis en Holborn, en la trinkejo ‘The Penderels Oak’, kiu estas la kutima renkontiĝo de la Londona junularo. Pro elekto de ĉefurba loko, kune kun iom da varbado pere de Facebook, ĉi tiu kunveno fariĝis la plej sukcesa en la lastatempa historio de JEB. Entute partoprenis 13 homoj, kaj la etoso vere estis internacia, pro la ĉeesto, ekzemple, de Magnus (origine el Svedio) kaj Veronika (origine el Hungario). Unu homo tamen havis pli longan vojaĝon ol ĉiuj aliaj – nia amiko Emmanuel vojaĝis al Londono de Calais je la sabato, nur por ĉeesti la JEB-renkontiĝon, tranoktis per Pasporta Servo kaj revenis al Francio la sekvan tagon! Ni ĉiuj ĝojis pro lia tute neatendita vizito.

Novaj ekskursoceloj

Jam la semajnfinon post tio okazis la sekva JEB-renkontiĝo, sed ĉi-foje nur neformala ekskursuo al la fama amuzejo Alton Towers. Tim, Clare, Thomas kaj Neil sufici kuraĝis por provi la plej timigajn ondantajn fervojojn, danke al la fakto, ke Thomas posedis kelkajn rabat-kuponojn por la parkejego. Pro



*JEBanoj kun drinkilaro ĉe la plej lasta renkontiĝo en Londono.
Sube: Clare Hunter kaj Gavan Fantom ĉe la Londona Lingvo-Foiro*

manko de antaŭ-averto, pli da homoj bedaŭrinde ne povis veni. Ni tamen ricevis tiom da mesaĝoj de aliaj homoj, ke ni intencas organizi plian ekskurson printempe. Se vi ŝatus veni aŭ havas opiniojn pri taŭgaj lokoj, bonvolu kontakti nin en la JEB-forumoj.

‘Bonega diskutundo’

Je la fina de oktobro Tim kaj Clare iris al Barlastono por partopreni en la bonega aŭtuna diskutundo de Derek Tatton. Kune kun membroj de SATEB, ni diskutis multajn interesajn temojn, ekzemple la mondan financan krizon kaj la signifon de arto. Tim eĉ gvidis unu el la sabataj sesioj, kiu temis pri la sep mirindaĵoj de la mondo. Ni ne ĉiuj interkonsentis pri ĉio, sed laŭ mi estas bone tiel, ĉar iom da disputado pliriĉigas la diskutojn!

Dejorado ĉe la Lingva Foiro

De la 30a de oktobro ĝis la 1a de novembro okazis la Lingva Foiro en Londono. JEBanoj Gavan, Tim kaj Clare dejoris kun ĉeforganizanto Heleno Fantom, kaj aliaj volontuloj Joyce kaj Elizabeth. Kiel pasintjare, ni sukcesis disdoni multajn ekzemplerojn de la JEB-jurnaleto *Saluton*. Ĉi-jare ni disdonis ankaŭ centojn da ekzempleroj de la nova KD A *Taste of Esperanto*, kiun preparis



JEB-prezidanto Tim Owen kun la helpo de Vilčjo Walker. Tiu celas prezenti Esperanton laŭ pli juneca, moderna stilo, kaj inkluzivas ekzemplojn de nuntempa Esperantlingva muziko.

Jarfinaj festegoj atendataj

Nun Kristnasko alproksimiĝas, kaj la JEBanoj pripensas, kie festi Silvestron. Guy vojaĝos al Zakopane por partopreni en la unua Junulara Esperanto-Semajno (JES), kiu estas kunigo de la tradicia germana Internacia Seminario (IS) kaj pli nova pola AS. Pli ol 200 gejunuloj jam aliĝis.

Intertempe Tim, Clare kaj Thomas intencas vojaĝi al Saarbrücken en Germanio por ĉeesti la 8-an Novjaran Renkontiĝon. Ĉi-jare la organizantoj starigos apartan programon por gejunuloj, la Novjara Internacia Semajno, kaj kvankam ĝi ne havos tiom da partoprenantoj kiel JES, ni tamen ege antaŭguas ĉi tiun pli frankvilan renkontiĝon, kiun ĉestos kelkaj el niaj germanaj geamikoj.

Kiel kutime, vi ĉiam povas legi la plej lastatempajn novaĵojn el la junulara movado ĉe nia retpaĝaro <http://www.jeb.org.uk>. Clare Hunter

EAB bookshop – selection

A few items below, marked with * after their price, include postage. For the rest, please add 15% for p. & p.. Cheques payable to 'EAB'. You may make phone purchases using your debit/credit card: tel. 0845 230 1887.

EAB cannot stock all titles, but can order items, for which you pay EAB in sterling. The UEA catalogue is at: <http://katalogo.uea.org>

Second-hand books are available from librarian Geoffrey King: www.biblbut.org/html/brokante.

JUST IN! Special purchase (costs £14.50 at UEA!)

Yvonne. Sonetoj malsekretaj Timothy Brian Carr £12.50

Rotterdam: Bero, 2009. 251 p. Pere de pli ol 200 sonetoj, la brita poeto promenigas la leganton tra sia vivo, abunda je muziko, kino, vojaĝoj kaj futbalo.

Kvazaū ĉio dependus de mi *NEW* Trevor Steele £16.30

Antwerp: FEL, 2009. 342 p., 21 cm. In 1930's Germany, a journalist struggles against the rise of fascism. This novel is inspired by the lives of Karl von Ossietzky and Kurt Tucholsky.

El la 'Verda Biblio' Izrael Lejzerowicz £3.30

Czeladz: 2007 (3rd ed.). 88p., 18cm, illustrated. A satirical pastiche of the contemporary Esperanto movement, in the manner of the Old Testament. Originally written in 1935.

Esperanto Mini-Course *NEW* £1.20

Barlaston: EAB, 2009. 32p., 15cm. A compact set of ten lessons based on the popular *Esperanto for Beginners* by Montague Butler.



Heksakloro unu komo tri Paul Gubbins £2.80

Chapéco: Fonto, 2005. 62 p., 21cm. Tragedy about a family caught up in chemical-industrial poisoning of the local environment. Winner of the UEA 2005 'Belartaj Konkursoj'.

Imitado de Kristo Thomas á Kempis £10.50

Antwerp: FEL, 1997. 166 p., 21cm, PB. The fundamental work of modern devotion, translated from the Latin by G.F. de Ruyver.

Kompil' vol. 1 (cassette) Vinilkosmo £5.76


Donneville: 1995. 59 min. A compilation of performances by top musicians, including Kajto, Persone, Solo, etc. Fifteen groups in all.

Konto de l' vivo Paul Gubbins £9.00

Antwerp: FEL, 1998. 139 p., 21cm. Four short plays. They are witty but also address current social issues. Two were awarded prizes in the UEA 'Belartaj Konkursoj'.

Knedu min Sinjorino! + Tabuaj vortoj en mondlingvo (CD-ROM)

pack £6.70* Special offer; buy Renato Corsetti's book and the CD-ROM of Don Lord's talk together, at a special price.



Leksikaj ekskursoj 3 Ch. D. Vleminck, E. Van Damme £10.20

Antwerp: FEL, 2005. 190 p., 21cm. More language exercises on contrasting themes, to enrich your vocabulary.


Lingva arto Ed. Vilmos Benczik £11.50

Rotterdam: UEA, 1999. 217 p., 21cm. A collection of 23 essays, paying tribute to the works of William Auld and Marjorie Boulton.

Lokomotivo, rulu nun! (CD) Kajto £9.99

Drachten: Windrose Music, 1994. 51 min. Music by the group Kajto, the Netherlands.

Londono kantas (CD) LEK £4.00* London: 1983. 51 min. Twenty popular



songs sung by the London Esperanto Choir. Includes a 12-page booklet of the words.

Manlibro pri olimpikaj vortoj £12.00

Beijing: 2008. 189+27 p., 19cm, colour-illustrated. A handbook of Olympic games and sporting terms, in four languages (Esperanto, Chinese, English, French).

Mi estas homo L.L. Zamenhof £16.35

Kaliningrad: Sezonoj, 2006. 287 p., 20cm. 76 original texts and an interview, which give a sufficient picture of Zamenhof's view of the world. Compiled and edited by Aleksander Korjenkov.

Nega blovado, La Alexander Puskin £1.40

Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. 16 p. A terrible blizzard alters the lives of two lovers who plan to elope without the permission of the bride's parents. Translated by Antoni Grabowski in 1888, just one year after the birth of the language.

Pronunciation CD John Wells £3.50*

Barlaston: EAB, 2001. 42 min. Talks by John Wells giving advice on correct pronunciation, with a song performed by Stephen Thompson. An optional accompaniment to any beginners' course.

Rusoj loĝas en Rusujo ed. Anna Löwenstein £9.40

Milan: FEI, 2007. 95 p., 21cm. Ten authors present their arguments for forming country names using the -ujo suffix.

Skota lingvo, hodiaŭ kaj hieraŭ, La William Auld £2.50

Glasgow: EAS, 2007. 16 p., 21cm. A concise overview (in Esperanto) of the modern Scots language. With a foreword and additional notes by Girvan McKay.

Tradiciaj rakontoj (CD & book) £7.85

Beauville: SAT, 2003. 47 p., 21cm. Fifty very short stories with a CD recording from a French group. Suitable for beginners and intermediate students.

William Auld – 75 jaroj £3.80

Jekaterinburg: Sezonoj, 1999. 47+8 p., 20cm. A biography, autobiography and poetry collection of William Auld, the Esperanto author nominated for the Nobel Prize for Literature. Interviewed and edited by A. Korjenkov.

Zamenhof-strato, La

Roman Dobrzyński £13.00

Ryto varpas, 2003. 286 p., 20cm, HB. Interview-style biography with Ludoviko Zaleski-Zamenhof, the grandson of L.L. Zamenhof, exploring his life and his memories.

40 pašetoj al plua posedo (CD)

NEW Ed. Léo Lentaigne £6.00
Beauville: SAT, 2009. 74 min.

Readings by Gaita and Leo Robert, Kribo, Andre Capus of 36 of the stories and articles from the beginners' reader.

Postcards – Zamenhof portrait


£0.45 (pack of 4) £1.80 (pack of 10) £4.

Full-colour portrait of Zamenhof painted in oils by Moscheles in 1907.

William Auld



75 jaroj



Naturaj vortordoj en Esperanto
estas resumo de analizo de modernaj tekstoj kaj de eksperimentaj laboroj, kies temo estis la aŭtonomeco kaj natureco de vortordosstrukturoj en nia lingvo. Surbaze de la teoria kadro de la t.n. Funkcia Gramatiko, ĝi provas ne nur priskribi, sed ankaŭ klarigi la observeblan ordigon de subjektoj, objektoj kaj adjektoj en frazo kaj tiun de adjektivoj en substantiva vortgrupo.

El la sama perspektivo ĝi esploras ankaŭ la sintaksajn aspektojn de la negacio.

La fakto, ke la trajtoj de Esperanto, estabilitaj en tiu ĉi laboro, konformas al fasko da universalaj propraĵoj de la homa lingvo, subtenas la konstaton pri la natureco de nia lingvo.

Wim Jansen (1948) estas inĝeniero kaj magistro pri kompara lingvistiko kun specialigo pri la eŭska lingvo. Li doktoriĝis pri teorio lingvistiko per disertacio pri la vortordo en Esperanto. Nome de Internacia Esperanto-Instituto li okupas la specialan katedron pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo.

Naturaj vortordoj en Esperanto. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2008. 40 paĝoj, kun bibliografio. 15 x 21 cm. ISBN 976-92-9017-103-4. €4,50 ĉe UEA. Mendebla ĉe EAB kontraŭ £3,80, inkl. de la sendokostoj.

Daŭrigo el paĝo 14
[/addons.mozilla.org/fr/firefox/search?q=esperanto&cat=all](http://addons.mozilla.org/fr/firefox/search?q=esperanto&cat=all).

• **Gentile rifuzas paroli angle**
 Guido Westerwelle, deputito kaj prezidanto de la germana FDP (Liberal-Demokrata Partio) gentile rifuzis respondi angle al jurnalisto de BBC, respondante: "Se tio vi deziras, ni povas kune trinki teon kaj paroli angle tiom, kiom plaĉos al vi. Tamen, ne ĉi tie, kadre de gazetara konferenco. Ĉi tie, ni estas en Germanio, kaj estas normale, ke la aferoj disvolviĝas en la germana, same kiel estus normale, ke ili disvolviĝu

en la angla en Britio." (Laŭ www.francophonie-avenir.com/video_Guido_Westerwelle_contre_le_tout_anglais.htm.)

• A dangerous language?

An article entitled 'A Dangerous Language?' by Gunnar Gällmo appears at <http://hubpages.com/hub/Dangerous-Language>.

• Mac kaj Esperanto

'Mac kaj Esperanto' estas artikolo, kiun Henri Masson aperigis ĉe Ipernity (www.ipernity.com/blog/32119/199607). Ĝi celas observi ĉu estas intereso kaj bezono interŝanĝi ideojn,

spertojn, informojn, interuzantoj de Esperanto, kiuj samtempe uzas komputilojn de Apple Macintosh.

• **Officialaj kursoj de Esperanto**
 ĉe universitatoj kaj altlernejoj
 Germain Pirlot (retadreso:
gepir.apro@pandora.be) regule kompilas liston de oficialaj Esperanto-kursoj ĉe universitatoj kaj altlernejoj tra la mondo. La plej lasta listo konsulteblas ĉe:
<http://uea.org/agadoj/instruado/universitatoj>:

Brazilo: Alfenas (Minas Gerais), Federala Universitato; Campinas (São Paulo), Pontifika Universitato Katolika de Campinas. *Ĉehio:* Brno, Pedagogia Fakultato de Masaryk-Universitato.

Francio: Mulhouse, Universitato de Alta Alzaco. *Germanio:* Münster, Universitato, kaj Universitato por la tria aĝo, Instituto por Ĝenerala Lingvistiko. *Italio:* Milano, Universitato de Milano. *Kongo D.R.:* Rutshuru (Nord-Kivu), Universitato de la Grandaj Lagoj. *Korea Resp.:* Iksan, Universitato; Wonkwang, Jukjeon, Chonan, Universitato Dankook; Seoul, Yongin, Universitato Korea Fremdlingva. *Rusio:* Kazan, Kazana Ŝtata Universitato; Tagil, Pegagogia Akademio. *Svedio:* Stokholmo: Universitato, Instituto pri Lingvistiko.

Venezuelo: Bolívar, Universitato.

• Amikaj rilatoj en Rusio

La socia reto vKontakte (vK, la plej populara en Rusio kaj Ukrainio) iĝas internacia kaj estos abunde reklamata en la interreto. La interfaco de la reto estas profesie tradukita en multaj lingvoj (kvankam ankoraŭ ne en Esperanto, tamen eblas vidi kaj elekti el multaj lingvoj). Partopreno estas senpaga, estas malpli da reklamado ol aliloke kaj forestas limigoj pri uzado de diskospaco.

Vidu: <http://amikeco.ru/2009/10/kontaktu.html>. Por registriĝi: <http://vk.com/reg72595>. Post registriĝo, uzu la serĉokampion en la supro de la interfaco (ligilo dekstre sub emblemo) por trovi la grupon 'Esperanto parolata', kaj aliĝu. (De Slavik tra <http://klaku.net/etikedoj/etikedoj/vk/>). □

Ligu vin kun la mondo Esperanta!

Ne forgesu aliĝi al UEA por la nova jaro!

• Vi povas pagi membrokotizojn de EAB kaj UEA kune

Kelkaj kotizoj de UEA por 2010

MG/Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado	£8
MJ(-T*)/Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO* (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kun la revuo <i>Kontakto</i> sen plia abonpago)	£20
MA(-T*)/Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo <i>Esperanto</i>	£50
SZ/Societo Zamenhof: mecenata kategorio, kiu ne inkluzivas membrecon	£100

Pagu al la brita peranto: EAB, Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887. Pagiloj estu skribitaj al 'EAB' (ne al UEA).



Kongres-aliĝoj kaj aliaj pagoj

EAB (la peranto) povas akcepti pagojn per debetkarto (kvankam ne per kreditkarto) ankaŭ por la Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj la Libroservo de UEA. Por tiuj celoj la administrejo de UEA eventuale malfermos por vi personan konton ĉe la Centra Oficejo (CO) en Nederlando. Bonvolu noti, ke la kongresajn kotizojn oni ne fiksas en pundoj, do ilia valoro varias laŭ la taga kurzo. Estas plej avantaĝe aliĝi antaŭ la antaŭa jarfino. EAB kutime disponas pri kongresaj aliĝiloj kaj la Unua Bulteno de la UK, sed ne pri librokatalogoj.

★ Universala Esperanto-Asocio

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
 Tel. 00-31-10-436-1044; retpaĝaro: www.uea.org

Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio refoje en Chester

Bildoj el la pasinta kunveno de Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio (*sube*), kies aŭtuna renkontiĝo okazis denove en Chester.

Harry Barron (*dekstre*) ĉef-prelegis pri 'La Manĝoj de Kimrio', antaŭvidante la venontjaran Britan Kongreson de Esperanto en Llandudno.

Harry eĉ antaŭpreparis multajn manĝojn kaj kunportis ilin el Kimrio, tiel ke horon post la tagmanĝo oni povis denove manĝi kaj kompari!



Fotis Peeter Aitai



Malsupre: *Če Frambo-Festeto de la Sud-Orienta Esperanto-Federacio, kiu okazis en Mitcham la 28an de junio.*



Keep informed!

- **EAB educational and leisure courses** in Esperanto run three times a year at Wedgwood Memorial College, Barlaston, Staffordshire, in January, August and October.
 - Educational and leisure courses for **beginners, post-beginners and advanced students**
- Leaflets available from the EAB office (tel. 0845 230 1887) and information online at www.esperantoeducation.com.

Ekpaku!

★ Plena listo de aranĝoj estas konsultebla ĉe la retpaĝaro www.eventoj.hu. Se vi deziras rigardi mapon de aranĝoj, iru al: www.esperantoland.org

10–23 januaro
Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro 2010, Sidnejo. Lecionoj, plago, sportoj, Festivalo de Sidnejo kun artistoj en- kaj eksterlandaj. Rete: aesk@dodo.com.au

15–17 januaro
'Ni Festivalu!' inkluzivas tri kursojn: **Ni Teatrumu!** (por aktoremuloj) **Drondo** (diskutrondo por progresintoj pri gravaj aktualaj temoj) kaj **Drondido** (*new discussion circle for post-beginners and less confident speakers*). Discussion notes and sample phrases and expressions will be provided), Wedgwood Memorial College, Barlaston. Inf.: EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887; rete: eab@esperanto-gb.org

26–29 januaro
Kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, Wellington. Eksterlandaj esperantistoj estas bonvenaj. Inf.: www.esperanto.org.nz.



EAB's stand presenting Esperanto at this autumn's London Language Show

14 februaro
Esperanto-Maskerada Kompanio "Paždroć" ĉe Internacia Karnaval Parado, Rijeka, Kroatio. Vi povas aliĝi al Esperanto-karnavalala grupo kaj ĝui karnavalon kiel partoprenanto aŭ spektanto. Inf.: Esperanto-Societo Rijeka, Blaža Polića 2, HR-51000 Rijeka, Kroatio. Rete: esperanto.rijeka@ri.htnet.hr

27 februaro–6 marto
Mediteranea Eo-Semajno en hotelo Le Renouveau, Agay (ĉe St-Raphaël), suda Francio. Trinivelaj kursoj, studado, promenado, familia vivo, vespero 'animado'. Inf.: Monique Prezioso, 92 impasse Jean Moulin, FR-83700 St-Raphaël. Tel. +33-4 94 83 06 88; rete: prezmoni@hotmail.com

2–4 aprilo
Sabla Printempo en Písek, Ĉehio. Komuna aranĝo de Ĉeha Eo-Asocio, Ĉeha Eo-Junularo kaj E@I. Trejnseminarioj kaj prelegoj kadre de "Eo kaj la Interreto". Solena inaŭguro de eksposizio pri Esperanto en la Urba Biblioteko. Inf.: pisek@esperanto.cz

2–9 aprilo
Printempa Semajno Internacia, St. Andreasberg, Germanio. Paska aranĝo por la tuta familio. Inf.: Jörg Gersonde, rete: psi@esperanto.de

3–4 aprilo
Verda Domo de Arizona, Usono. Printempa renkontiĝo, idealata por

familioj. Inf.: Anđelina Taremi, PO Box 9342, Scottsdale, AZ 85252-9342; fakse: (602) 426 8131; rete: angelina_t@msn.com

17 aprilo
32a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. Prelegoj (i.a. de Mark Fettes), filmoj, libroprezentoj k.a.. En la libroservo ĉio rabatita; senpagaj kafo kaj teo. Inf.: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam; rete: uea@co.uea.org

29 aprilo–9 maju
22a Aroma Jalto, Ukrainio. Esperanto-festivalo, kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de la partoprenantoj kaj konatiĝi kun la belega naturo de Krimeo. Inf.: V. Hordjenko, p/k 35, UA-01133 Kiev; rete: volodomir@ukr.net

8–15 maju
62a Kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Eo-Federacio), Sofio, Bulgario. Inf.: 62a Kongreso de IFEF, BG-1080 Sofia, Ivan Vazov 3; rete: kozsu13@freemail.hu

12–16 maju
Printempa BARo 2010, Bad Münder (inter Hanovero kaj Hameln), Germanio. En la arbaro, tial idealata por familioj kun infanetoj. Inf.: Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio; rete: andim@gmx.li

14–17 maju
91a Brita Kongreso de Esperanto, Llandudno, Norda Kimrio. Inf.: EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887; rete: eab@esperanto-gb.org

21–24 maju
Komuna franca kaj germana Esperanto-kongreso, Kaiserslautern, Germanio. Inf.: Dirk-Werner Hartmann, Sprachschule Rahn, z.Hd. Herrn Hartmann, Karl-Marx-Str. 37, DE-67655 Kaiserslautern; rete: gek2010@esperanto.de

22–24 maju
7a Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto, Tririveroj, Kebekio. Turisma amikeca semajnfino. Okazas vizitoj kaj komunaj manĝoj. Inf.: Esperanto-Societo Kebekia,

KALENDARO

CALENDAR

6358 de Bordeaux, Montréal,
Québec, H2G 2R8; rete: informo@esperanto.qc.ca

27–31 majo
Rusia Esperanto-Kongreso,
Peterburgo. Internacia Esperanto-renkontiĝo kun ĝuado de la urbo.
Venu frandi la rusan kulturon kaj trovi amikojn inter rusiaj esperantistoj! Inf. rete: kongreso@reu.ru, kaj ĉe Anna Butkevič: annaespero@mail.ru

4–7 junio
105a Skota kaj Internacia Kongreso de Esperanto, Berwick-upon-Tweed, Skotlando/Anglio. Festu kun la skota movado nian 105an kongreson (jes, tio ne estas preseraro!) en la bela apudmara urbeto Berwick-upon-Tweed sur la skota-angla landlimo. Inf.: Ed Robertson, 52 Easter Drylaw View, Edinburgh, EH4 2QP. Tel. 0131 332 9803; rete: ed-robertson@teleosvet.co.uk

5–19 junio
Esperanto-Karavano per la Trans-Siberia Trajno – komuna vojaĝado survoje al la 6-a Azia Esperanto-Kongreso en Mongolio. Organizas Tatjana Loskutova, RUS-153048 Ivanovo, ul. Gen. Hlebnikova 48-71; rete: lota49@mail.ru (ilustra filmeto en Jutubo!).

19–21 junio
Verda Domo de Arizona: Internacia Montara Tendumo proksime al Granda Kanjono. Dume okazas Indiĝena Indiana Festivalo. Inf.: Angelina Taremi (vidu supre).

19–23 junio
6a Azia Esperanto-Kongreso, Ulanbatoro, Mongolio. Inf.: <http://mongolio.info/>; ankaŭ: s-ro Lee Jung-kee, rete: esperanto@saluton.net

20 junio
Tradicia Renkontiĝo de ĉehaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de la monto Ĉantorio. Inf.: suchanekj@seznam.cz

26 junio – 4 julio
46aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, Visaginas, Litovio. Somera 'universitato', paroligaj kaj perfektigaj kursoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, ekskursoj kaj multe pli. Inf.: Litova Esperanto-Asocio, p.k.



167, LT-44287 Kaunas. Pošt. +370-687-12219; rete: litova.ea@mail.lt

27 junio–2 julio
Esperanto-kurso en ĉiuj niveloj, Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, Finnlando. Inf.: Tiina Oittinen, sekretario de Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki; rete: eaf@esperanto.fi

2–10 julio
Somera Esperanto-Studado 2010, Pieš'any, Slovakio (nur 80 km de la ĉefurbo Bratislavo) – 3a renkontiĝo de lernantoj de Lernu.net. Atm lernado, ptm ekskursoj, vespero amuzado. Inf.: Peter Baláž, Vít'azná 840/67-A, SK-958 04 Partizánske; rete: esperanto666@gmail.com

10–24 julio
Malkovru Ukrainion! – sen kursoj, nur ekskursoj! – Kiev kaj Jalto (suda bordo de Krimeo). Inf.: M. Lineckij; rete: oi-centro@ukr.net

11–17 julio
43a Konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), Hotelo Canimao, Matanzas, Kubo. Inf.: info@ilei.info

17–23 julio
Internacia Esperanto-Konferenco, Herzberg – 'La Esperanto-urbo', Germanio. Kultura kaj turisma semajno. Temo: "Kial Esperanto estas revolucia lingvo?" Inf.: Peter Zilvar, Grubenhagenstr. 6/8, DE-37412 Herzberg, Germanio; rete: esperanto-zentrum@web.de

17–24 julio
95a Universala Kongreso de Esperanto, Havano, Kubo. Inf.: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: uea@co.uea.org

New Members of EAB

Dim D. Christidis, Greece
Francesco Maurelli, Edinburgh
Don Rowell, Cheshire
J. Sadot, Jersey

New Supporter
C.J. Collins, Shaftesbury

Deceased Members
Beatrice Clarke, Hove
David Hill, Reading
H.J. Jarvis, Micklemover
W. Nesbitt, Kendal

Completed the Free Postal Course
Susan Huang, Hong Kong

Examination Success
Michael Heary, Manchester.
Elementary – with Distinction
Jim McNeill, Elland. Intermediate – with Merit
Andreas Witte, Oxford. Intermediate – with Distinction.

24–31 julio
66a Internacia Junulara Kongreso, Los Cocos, Kubo. Inf. UEA (vidu supre).

2–11 aŭgusto
Somera Seminario de ILEI-Ĉinio, Taiyuan, Ĉinio. Somera seminario por Eo-instruistoj kaj instruemuloj. Matene prelegas kaj posttagmeze instruas, babilas, prezantas, ludas. La ĉefa celo estas lerni aliajn instrumetodojn kaj paroligi ĉinajn esperantistojn. Alilandanoj estos bonvenaj. Inf.: Prof. Gong Xiaofeng, Lernejo de Media kaj Kemia Inĝenierado, Universitato de Nanchang, CN-330031 Nanchang; rete: arko.gong@qq.com

3–9 aŭgusto
Internacia Junulara Semajno, Pécs, Hungario. Internacia aranĝo por gejunuloj. Inf.: Hungara Esperanto-Junularo, s-ino Gede Krisztina Dévainé; rete: hej@eszperanto.hu

8–11 aŭgusto
5a Internacia Renkontiĝo de Meditado, Seulo, Suda Koreio. Esperantista Asocio de Ŝonbulismo okazigos renkontiĝon, en kiu oni povos meditadi, ekskursi kaj sperti korean kulturon. Rete: esperanto@saluton.net

9–13 aŭgusto
50a Somera Festivalo, Wedgwood Memorial College, Barlaston. Alt- kaj meznivelaj programeroj lingvaj, literaturaj kaj kulturaj, kun datrevena festado. Inf.: EAB, tel. 0845 230 1887 (vidu ankaŭ paĝon 2).

14–21 aŭgusto
La 14aj Pluezekaj Renkontiĝoj Internaciaj, Bretonio, Francio. Inf.: www.pluezek-esperanto.net; tel. 069 8495982; rete: pluezek@gmail.com

21–28 aŭgusto
Ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj (EKOTUR) en regiono de lagoj en suda Ĉeĥio. Inf.: Kava-Pech, Petr Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice. Tel. +420-257712201; fakse: +420-2577 12126; rete: chrdle@kava-pech.cz

11 septembro
Literumiloj kaj Lingvohelpiloj. Kolokovo/ateliero gvidata de Marek Blahuš, Eckhard Bick kaj Toon

Witkam (ESPSOF), Hago, Nederlando; rete: cxej@blahus.cz

12 septembro
9a Spiritisma Esperanta Renkontiĝo, Rio de Janejro, Brazilo. Okazos prelego kaj artaj momentoj. Inf.: E.G. Lazaro Luiz Zamenhof, Strato Abilio dos Santos 137, Bento Ribeiro; rete: contato@lazaroluizamenhof.com.br

19 septembro
13a Esperanta Renkontiĝo de Taguatinga, Braziljo, Brazilo. Inf.: tek.esperanto@ig.com.br

2–9 oktobro
18a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en bela mediteranea urbo de la 'Costa Brava', Hispanio. Inf.: luis_serrano@mixmail.com

9–11 oktobro
17a Aŭtuna Renkontiĝo de Eo, Sylver Bay, Lake George, NY, Usono.

Kursoj, prelegoj, ludoj kaj pli sur belega loko ĉe lago. Inf.: Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado H2G 2R8; rete: informo@esperanto.qc.ca

11–17 oktobro
Internacia Paroliga Semajno por komencintoj kaj jam parolantoj, Dobřichovice, apud Prago, Ĉeĥio. Inf.: Kava-Pech (vidu supre).

22–24 oktobro
Course-you-Can (for beginners and post-beginners); **Drondo** (diskutrondo por progresintoj). Inf.: EAB (vidu paĝon 2).

24–30 oktobro
5a Kieva Eo-Semajno, Kiev, Ukrainio. Inf.: V. Hordijenko (vidu supre).

2011
23–30 julio
96a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando. Inf.: EAB/UEA (vidu paĝon 2).

- Make sure media reference sections and your town, county, university or school library have a copy of this unique work of international reference in English

Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto

- preface by Dr. Humphrey Tonkin, Professor of the Humanities and President Emeritus at the University of Hartford, Connecticut
- general introduction to Esperanto literature, its history, evolution and modern development
- individual introductions to the five periods of the literature
- over 300 individual articles on the most important writers and their work in chronological order, with biographies and critique
- sample literary texts from some of the best original authors
- an introduction to the language itself, its linguistic structure and creative capabilities, including *Esperanto from the Viewpoint of a Writer* by Claude Piron
- extensive bibliographies and index

Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887-2007 by Geoffrey Sutton. New York, NY: Mondial, 2008. x + 728 pages. Format: 6" x 9" (152 x 229 mm). ISBN 978-1-59569-090-6. Price €66.00 + p.&p.

- Place your order online at <www.librejo.com/enciklopedio>, by fax (+1-208-361-2863), or by e-mail: informo@librejo.com. Mondial will respond promptly with information on the various means and prices of carriage. Mondial (Ulrich Becker), 203 West 107th Street, Apt. 6 C, New York, NY 10025, USA.

Resale outlets should contact Mondial (informo@librejo.com) to agree a price. Pay only after agreement on the cost of carriage. Payment may be made by US bank cheque in US\$; or by giro to a bank in Germany; or to Mondial's account at UEA, Netherlands. Also available from EAB at £57.95 including postage and packing.

